

Uniko

Ma Zifu

danke al hazarda birdo

semo trovis grundon. vivo apud arbo.

oni rabis tempon for.

tero. sablo. kaj dezerto.

floroj. trunko sen folio.

karno. skeleto.

sen flugilaro.

spuroj sedimentis.

larmoj ne kapablas fari maron.

preĝo. preĝi. nure fulmo, tondro.

pluvo pluvas trans montaro.

stari pere de la spino.


la rigardo pikas tra la horizonto.

fore ...la diluvo.

2004-11-18

Plena

Mao Zifu



la naŭ steloj de ŝakjamunio

brilas sur la kulmo.
nokto tra eono fluas.
for de tranĉilaro, la manparo serĉas lakton,
ho, ne por memsato.
beboj la klonitaj suĉas cicon velkan,
ekster mia lito solitera.
vido de laŭzio trafas muron
svarmigitan de gehomoj.
sen batalo kaj sen ŝafoj,
nur ĉielo kaj terglobo inter manoj.
eva kaj adamo restas skulptoj disigitaj.
unu plusas unu: du ja ne tri.
glavo de taŭismo sangon donas
sed neniun fruktas karnon.
konfuzio diktas: viro sur la ino.
en la nigro ne sub suno.
libro senlitera do min akompanu
ĝis la korpo iĝos cindro.

2004-11-18

La Kancerkliniko/n-ro 114/apr-maj-jun 2005